

65-a jaro n-ro 188 2024:4

la lampiro



La anagramo de Anna
Rakonto de Juan Trepiana

Quer aprender Esperanto?

**PROGRAMO
MIA AMIKO**



pma.esperanto.org.br

Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**
Kulpetas ankaŭ vi
- 5 | **Vortoj de la prezidanto**
Paulinia atendas vin!
- 6 | **Kino kaj aliaj artoj**
Hilde Weber
- 8 | **El mia vidpunkto**
A.I. La granda koŝmaro
- 11 | **Por iom metidi**
Deziraro
- 13 | **Iom da saĝo**
La juĝisto kaj la ovo
- 14 | **Invite**
Lanĉita Novelo-Konkurso 2025
- 15 | **Rakonto**
La anagramo de Anna
- 18 | **Edukado**
La Baza Eduka Disvolva Indekso
kaj ĝiaj efikoj al la brazila socio
- 20 | **Iom da gramatiko**
Lingvaj Respondoj
- 22 | **Premiere**
Freneza Dorvalino
- 24 | **Recenze**
Pri volontuloj kun okulvitroj

la lampiro

65-a jaro n-ro 188 2024:4

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima

Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf

Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues

Kasisto: José R. Tenorio da Silvas

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2024

Simpla Membro	R\$ 200,00
Subtena Membro	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro	R\$ 100,00

Kulpetas ankaŭ vi

Ĉi tiu numero de nia amata revuo de EASP aperas kun granda malfruo. Pri tio kulpas ekskluzive ĉi tiu redaktanto, kiu pardonpetas humile. Pli ĝuste dirite, kulpas liaj okuloj, kiuj decidis subite striki kaj preskaŭ komplete rifuzis vidi la mondon kaj ĝiajn absurdaĵojn. Dum pluraj semajnoj, la maljuna redaktanto fariĝis preskaŭ tute blinda. Kaj mi povas sincere aserti al vi, kara leganto, ke estas konsternante malfacile kunmeti lampiran numeron sen la helpo de bone funkciantaj okuloj. Kulpetas tamen ankaŭ vi, kara leganto, kiu ne postulas de la estraro de nia EASP pli sanan, pli junan, pli kompetentan redaktanton. Dume, iele-trapele, mi klopodas plenumi la

taskon, kalkulante pri via bonkora pardono, kara leganto.

Ĉi tiu numero enhavas pensigajn tekstojn, kaj mi tre ŝatus ricevi viajn opiniojn pri ili. Se citi nur du, mi mencias la gravan artikolon de Patrícia Guerra pri la eduka sistemo en Brazilo; kaj la kortuŝan novelon de nia argentina amiko Juan Trepiana, kiu sin montras talenta verkisto kun tute originalaj ideoj. Dankon cetere al ĉiuj aliaj kunlaborantoj, kiuj fidele, regule sendas siajn tekstojn por nia revuo. Ili riĉigas nian kulturon, nian spiriton, nian civitanecan per siaj ideoj. Ni fieru, ke ni havas inter ni tiajn klerajn, klarvidajn homojn, kiuj pretas kundividi kun ni siajn pensojn.



Baldaŭ lanĉota en Paulínia

Tri noveloj de Graciliano Ramos

Tradukis Paulo S. Viana

Paulínia atendas vin!

Saluton, gelegantoj de La Lampiro!

Mi kun granda plezuro skribas al ĉiuj plian fojon, por peti, ke vi partoprenu en nia kongreso okazonta en la urbo Paulínia. Ni laboras por vi, kun vi, por doni al ĉiuj vi agrablan, komfortan lokon. Por akcepti vin. Paulínia estas urbo, kiu ricevas per larĝa brakumo ĉiun vizitanton, kun siaj promenejoj, bongustaĵoj kaj sia agrabla popolo.

Mi ne dubas, ke ĝi estos la plej bona Kongreso post la pandemio, kaj senti homan varmon inter ni havas sian valoron. Nia rigardo “okulo en okulon” estos magia afero. Niaj prelegontoj estas gravaj personoj en la monda movado por Esperanto.

Mi kaj mia estraro kaj kunlaborantoj estas feliĉaj povi organizi ĉi tiun eventon, kaj ĝia preparado komenciĝis en januaro, kaj estos kronita je la 14-a de septembro kun ĉiuj vi, kiuj ĉeestos en la kongresejo, unuiĝintaj por la Esperanto-movado.

Ni diskutos pri la estonteco kaj pri tio, kio necesas por antaŭenpuŝi Esperanton, ni devas pensi pri la estontaj generacioj de samideanoj.

Dankon al ĉiuj, kiuj legas La Lampiron. Ni petas vin inviti almenaŭ unu amikon partopreni en nia movado.

Scion ni disdonu, ne kaŝu.

Baldaŭ lanĉota en Paulínia

Katarina, la eta

Plia infanlibro verkita de Paulo S. Viana
kaj ilustrita de Anna Lobo de Carvalho



Hilde Weber

Anna Lobo de Carvalho

Hildegard Wilhelmine Weber, pli konata kiel Hilde Weber, estis pentristo, ilustristo kaj kartunisto. Ŝi naskiĝis en la germana urbo Waldau bei Kassel je 09a de septembro 1913. Ŝia patro estis la militisto Edmund Mar Weber, kaj la patrino Hildegard Lilly Elizabeth Otter. Hilde estis flegita de amikoj de ŝia familio kaj ŝia onklino Cläre, kiu estis artistino kaj ĵurnalistino de Hamburgo. Ŝiaj gepatroj disiĝis kiam ŝi estis eta. Poste, Hilde frekventis kurson de Belartoj en la Lernejo de Grafikaj Artoj de Hamburgo, kaj eĉ laboris en du germanaj ĵurnaloj kiel ilustristo.

En la jaro 1933, Hilde decidis veni al Brazilo por resti kun sia patro, kiu translokiĝis al tiu lando post la Unua Monda Milito. En Rio de Janeiro, ŝi ekilustris la raportojn de Ruben Braga ĉe “Diários Associados”. Kaj ankaŭ por la revuoj “O Cruzeiro” kaj “A Cigarra”, kreante ĝiajn kovrilojn de 1933 kaj 1934.

En la urbo São Paulo, en kiu ŝi vivis inter 1943 kaj 1950, Hilde desegnadis



por la ĵurnaloj “Folha da Manhã” kaj “Noite Ilustrada”. Tie ŝi ankaŭ partoprenis en grupo de artistoj nomata “Santelenistas” kiu kunsidis en “Palacete de Santa Helena. Ne sufiĉe, ŝi ankaŭ laboris kun pentraĵoj kaj ceramikoj en la ateliero Osirarte, kune kun artistoj kiel Alfredo Volpi kaj Mario Zanini.

En 1950, Hilde revenas al Rio de Janeiro, pro invito esti kartunistino de la ĵurnalo “Tribuna da Imprensa” de Carlos Lacerda. Tie ŝi desegnis multajn

satirajn karikaturojn pri la novaĵoj de la epoko, kaj ofte ilustrante la prezidanton Getúlio Vargas. En la ĵurnalo ŝi kreis la bildstrion “Tribulino”. Hilde tie laboris ĝis ĝi vendiĝis en 1962. Kaj post tio, ŝi revenas al la urbo São Paulo, kie ŝi eklaboris por la ĵurnalo “O Estado de São Paulo” por kiu ŝi kunlaboris ekde 1956.

Aldone ŝi faris ekspoziciojn en kelkaj eldonoj de “Bienal de São Paulo”, en la Salono de la Sindikato de Penristoj, en la Ekspozicio de Moderna

Arto en Belo Horizonte kaj la Oficiala kaj Nacia Salonoj de Moderna Arto de Rlo de Janeiro. Fine, Hilde emeritiĝis en 1989 kaj forpasis en São Paulo je la 13a de decembro de 1994.

Mi esperas ke vi ĝuis koni iom pli pri la vivo de Hilde Weber, la unua virina kartunistino de la brazila gazetaro. La kontribuoj de Hilde estis vere gravaj kaj buntaj por la historio de Brazila gazeto, ĉefe en medio kie regas viroj. Mi invitas vin esplori pli pri ŝiaj verkoj! Ĝis la sekva fojo!



Por pliaj informoj iru al: <https://esperanto.org.br/kongreso>

58° CONGRESSO BRASILEIRO DE
ESPERANTO
14 A 17 DE NOVEMBRO DE 2024 • SALVADOR, BAHIA



A.I. La granda koŝmaro

Francesco Franceschini

Timega koŝmaro trakuras la mondon. Generaj Retoj (GR), la lasta stadio de Artefarita Intelektio (AI), transdonadas al ĝi teruran potencon. Trajtoj kaj aspektoj de la minacanto estas grandparte nekonataj kaj, kiel ĉiu nekonata grandskala fenomeno, ĝi enkorpigas timegon en la homon.

Tamen ne lasu, ke nin kaptu angoro pro apokalipsaj rezultoj. La fakton, ke la ĝenerala scio pri la temo estas tiel mankohava, ni povas ankaŭ konstrueme rigardi, malkovrante interesajn lernendajn flankojn.

Historio komenciĝinta kun Leibniz (1646-1716) kaj fluanta tra Turing (1912-1954), tiel elstaraj homoj, ke ili jam parolis pri blindaj pensoj, pri surdaj pensoj, pri apartaj aŭtomatismoj de la menso, kiujn ili reve antaŭvidis kiel artefarite reprodukteblajn.

Historio kiu fontas el la humanismo kaj kun la humanismo starigis striktan rilaton, kiam la teknologia animo de la homa specio estis metita en la centron de la homa pensado.

Ne ekzistas humanismo sen teknologioj, krom en stereotipa, folkloraj kaj stulta formo, kiel tiu, kiu kontraŭmetas la homon al la maŝino.

Certe ne tia estis la ideo de Dante Alighieri (1265-1321), Filippo Brunelleschi (1377-1446), Leon Battista Alberti (1404-1472), Leonardo da Vinci (1452-1519), Erasmo de Roterdamo (1465-1536), Mikelanĝelo Buonarroti (1475-1564), Vilhelmo Ŝekspiro (1564-1616), ka.: ĉiuj ĉi eĉ ne ensonĝe imagis esti tiel superstiĉaj kaj supraĵaj je pripensado pri la homa specio.

Pri la generaj retoj, nin timigas la fakto, ke ili neatendite mastrumas la lingvon per kombinatorika procezo de probableco en multdimensiaj neŭronaj retoj kaj sukcesas kunmeti senechavajn, koherajn frazojn ŝajne formulitajn de lerta homo.

Sed sufiĉas iri iom malantaŭen en la tempo por trovi en ĵurnalaj kronikoj la timojn generitajn en la laborista klaso far la unuaj vapormaŝinoj, poste la elektraj; far la mekanikaj kalkuliloj,

poste la elektraj kaj hodiaŭ elektronikaj, ĉiuj minacantaj nepre atrofii la homan menson, senespere kondamnitan al nekapableco kalkuli.

Fakte tio ne okazis. Male, pliboniĝis la vivo de la popoloj, kie ĉi tiuj teknologioj disvolviĝis.

Ekzistas du tipoj de fantomoj.

– Tiuj utilaj, kiuj rakontas al ni la historiojn pri tio, kiel la maŝinoj venis en la mondon kaj disvastiĝis.

– Tiuj malutilaj, idoj de miskomprenado, nescio kaj timo. Inteligenta maŝino estas spegulo nia.

Ni timas la artefaritan Intelekton ĉar la plej timinda fantomo estas tiu, kiu antaŭiras nin kiel maŝino kapabla decidi aŭtonome, "pensi" memstare. Estas la reflektita bildo de ni, kiuj havas la iluzion posedi la liberecon pensi kaj agi. La vero estas, ke ni timas nin mem kaj niajn abomenaĵojn kiujn ni ne intencas rezigni.

Komencante de la alfabeto skribado, jam Platono sciis, ke ni ne plu estos pensintaj kaj agintaj kiel homoj de la parola epoko.

Fakte ni estas homaj ĉar ni havas la teknologion. Simioj ne. Ni ĉiuj baldaŭ havos personan similtanan profesie poliglota interpretiston, privatan

sekretarion, je unua nivelo kuraciston, juriston, burokratan asistanton, instruiston, perso-nan trejniston ktp.; ĉiuj je nia rekta dispono 24 horojn tage, 365 tagoj jare.

Nia interagado kun teknologioj malfermas agadspacojn kaj konceptajn horizontojn, ene de kiuj ni havas la devon denove pripensi. Nia vivo spertos radikalajn ŝanĝojn kiuj jam komenciĝis kaj ne estas haltigeblaj.

Antaŭ ol ekpaniki, ni havas la devon kompreni kiujn horizontojn, kiujn modelojn de kunloĝado aŭ kunevoluo kun maŝinoj ni prefere bezonus; krom la fakto ke interagado aŭ komunikado kun ne-homaj subjektoj estas io, kio jam okazas kaj des pli rapide kaj vaste okazos.

La avantaĝo de la homo super maŝino kuŝas en lia kapablo erari, kio ne estas la fakto ke ni eraras, sed la konscio pri la kapablo erari.

Ĉiuj eraras, sed nur malmultaj scias trakti la erarojn. Trakti la erarojn signifas havi la scion mastrumi la eraron kiel informon, kiu permesas al ni revizii niajn kredojn aŭ konvinkojn kaj pripensi novajn agadstrategiojn.

La maŝino povas korekti, sed nur sekvante antaŭenmetitajn instrukciojn.

La maŝino ne konscias, ke ĝi faras tion. Ni havas la eblon lerni. Bedaŭrinde, tio malofte okazas en lernejoj, ĉar eraro estas plejparte frustra sperto markenda per ruĝa streko, malaltiganta la taksadon de la erarinto.

La konscia konstruema interagado kun ĉi tiuj maŝinoj postulas la kapablon lerni kiel rekoni erarojn kaj sekve ilin mastrumi. Tiel maŝinoj fariĝis fortegaj helpantoj multobligantaj la homan povon.

Tiuj, kiuj timas malutilojn por sia mensa viglo kaj efiko, povas trankviliĝi ĉar ĉiu medio per si mem kontribuas al ties sensora kaj kognativa reekvilibrigo.

Kaj ne nepre tio okazas en la senco de perdo. Male, bone trejnita operacianto, kiu scias kiel ĝuste interagi, povas ricevi grandajn avantaĝojn de inteligenta maŝino kiu generas respondojn, ĉar li kapablas ekspluati ĝian enorman kalkulpovon.

Konklude, necesas iom pli da pragmatismo kune kun pli disvastigita scienco kaj humanisma scio en la lernejoj kaj efektiva trejnado de la uzantaro. Scienca esplorado jam provizis koncernajn datumojn kaj praktikajn indikojn. Al registaroj kaj al regantoj taskas mastrumi la kelkjaran neprokraste-

blan transiron. Preskaŭ ĉio dependos de ilia kompetento kaj lerto.

Sektoroj kiuj spertos malkreskon:

1. Administraj kaj Sekretariaj Laboroj: Multaj taskoj en ĉi tiu sektoro, kiel datum-enigo, planado, kaj baza klienta servo, ks.
2. Fabrikado kaj Produktado: Aŭtomatigitaj sistemoj kaj robotoj povas anstataŭi homajn laboristojn en fabrikoj, precipe por ripetaj kaj fizikaj taskoj.
3. Vendaj Asistantoj kaj Kasistoj: Kun la kresko de memservaj kioskoj kaj reta komerco, la bezono de homaj vendaj asistantoj kaj kasistoj malpliigos.
4. Transporto kaj Logistiko: Aŭtonomaj veturiloj kaj dronoj povus redukti la bezonon de ŝoforoj kaj liveristoj.

Sektoroj kiuj spertos kreskon :

1. Teknologio kaj IT: Pliiĝos la postulo je AI-specialistoj, datumsciencistoj, kaj cibersekurecaj ekspertoj.
2. Sanservo: AI helpas en diagnozoj kaj traktadoj, kio kreas bezonon por teknikistoj kaj datumanalizistoj.
3. Verda Energio: AI-optimigo de energikonsumo kaj renovigeblaj

(Daŭrigota sur la paĝo 12)

Deziraro

Max Ehrmann (trad. James R. Piton)

Trankvile sekvu inter la kvieteco kaj la hasto, memorante, ke ĉiam estas paco en silento. Laŭeble kaj sen humi-
liĝo, harmonie kunvivadu kun ĉiuj, kiuj
vin ĉirkaŭas.



Parolu vian veraĵon milde kaj trank-
vile kaj aŭskultu tiun de la aliaj, eĉ tiun
de la sensenculoj kaj nesciuloj – ankaŭ
ili havas sian propran historion.



Evitu la agresemajn kaj perturbi-
tajn homojn, ili afliktas nian spiriton.
Se vi komparos vin kun la aliaj, vi
fariĝos pretendema kaj ofendita, ĉar
ĉiam estos iu malsupera kaj iu supera
al vi. Intense travivu tion, kion vi jam
povas realigi.



Restu interesata pri via laboro, eĉ
se ĝi estas simpla, ĉar ĝi estas tio, kio
reale ekzistas tra la tuta tempo. Estu
zorgema pri la aferoj, ĉar la mondo
plenas je ruzeco, sed ne lasu vin

kaptiĝi de malfidemo, virteco ĉiam
ekzistos.



“Vi estas ido de la Universo, frato
de la steloj kaj arboj. Vi meritas esti tie
ĉi kaj eĉ se vi ne povas konstati, la Te-
ro kaj la Universo efektivas sian
sorton.”



Multaj luktas por altaj idealoj kaj
ĉie la vivo plenas je heroaĵoj.



Estu vi mem, ĉefe ne pretendu esti-
mon nek malfidu amon, ĉar eĉ antaŭ



tiom da sekeco kaj senrevemo ĝi estas tiel daŭra kiel la herbejoj.



Karese akceptu la konsilojn de la pli maljunaj, sed estu komprenema antaŭ la novigaj impetoj de la junularo.



Nutru la forton de la Spirito, kiu protektos vin en la neatendita malfeliĉo, sed ne senesperigu antaŭ imagaj danĝeroj, ĉar multaj timoj fontas el la laciĝo kaj soleco.



Kaj malgraŭ rigora disciplino, estu afabla al vi mem. Estu do en paco kun Dio, sendepende de tio, kiel vi Lin komprenas, kaj ne gravas kiujn laborojn kaj aspirojn vi havas, en la laciga vivovojo restu en paco kun via propra animo.



Super la falseco, la elreviĝoj kaj la malfacilaĵoj, la mondo ankoraŭ belas, estu prudenta. Ĉiel klopodu por esti feliĉa.



Daŭrigo de la paĝo 10 (A.I. La granda Koŝmaro)

energifontoj kreas novajn laborlokojn.

4. Eduko: Pliiĝos la uzo de AI por personigita lernado, kio postulas edukteknologio-specialistojn.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Gottfried_Wilhelm_Leibniz

https://eo.wikipedia.org/wiki/Alan_Turing

<http://gustavomicheletti.it/index.php/saggi/46-i-pensieri-qciechq-e-qcordiq-in-leibniz-e-nel-cartesianesimo>

http://www.arturomona.it/html/pensieri_muti.html

<https://www.weforum.org/agenda/2023/05/jobs-lost-created-ai-gpt/>

<https://www.nexford.edu/insights/how-will-ai-affect-jobs>

<https://www.weforum.org/agenda/2018/09/artificial-intelligence-shaking-up-job-market/>

<https://www.weforum.org/agenda/2023/05/future-of-jobs-in-the-age-of-ai-sustainability-and-deglobalization/>

<https://cepr.org/voxeu/columns/impact-artificial-intelligence-growth-and-employment>

2024.08.

La juĝisto kaj la ovo

Malba Tahan

Antaŭ longe, reĝo devis nomumi juĝiston al la Supera Kortumo de la regno. Tri kandidatoj sin prezentis.

La reĝo decidis testi ilin. Li vokis ilin antaŭ sin kaj ordonis al servisto meti pleton kun ovoŝelo antaŭ ilin. La ŝelo havis truon, tra kiu la ovoblanko kaj la ovoflavo estis forigitaj.

— Kio estas tio? — demandis la reĝo, alparolante la unuan kandidaton.

— Ĝi estas ovo! — li respondis, ne hezitante eĉ sekundon.

— Vi ne estas bona juĝisto por mi — diris la reĝo. — Vi estas tro rapida en viaj juĝoj.

La dua kandidato estis pli singarda antaŭ ol respondi. Li alproksimiĝis al la ŝelo, delikate tuŝis ĝin per la fingropintoj, turnis ĝin de unu flanko al alia por pli bone ekzameni. Tiam, turninte sin al la monarĥo, li respondis: — Ĝi estas ovoŝelo.



— Tre bone — diris la reĝo. — Mi vidas, ke via respondo estas multe pli bona ol tiu de la unua. Ni vidu tamen kiel respondos la tria kandidato.

La respondo de la tria kandidato ne okazis tuj. Li prenis la ŝelon, rompis ĝin kaj ekzamenis ĝin ĝisfunde. Li prenis el ĝi malgrandan fragmenton, rigardadis ĝin per mikroskopo kaj faris kompletan kemian analizon de la substancoj de la ŝelo. Poste li konsultis plurajn librojn pri birdoj kaj ovoj. Nur tiam li prezentis al la reĝo raporton, kiu finiĝis jene:

— Mi povas konkludi, kun certeco, ke la objekto estas ŝelo de anasa ovo.

(Daŭrigota sur la paĝo 14)

Lanĉita Novelo-Konkurso 2025

Akademio Literatura de Esperanto, kune kun la retejo *bobelarto.ink*, kaj kun apogo de Universala Esperanto-Asocio, oficiale lanĉis la eldonon por 2025 de la jam tradicia Interkultura Novelo-Konkurso. En ĝia 5-a eldono, la kurioza proponita temo estas: “La detalo kiu ŝanĝas ĉion”. Rajtas partopreni neniam publikigitaj tekstoj de maksimume 2000 vortoj, originale en Esperanto aŭ en unu el la jenaj lingvoj: franca, itala, kataluna, persa, rusa kaj ukraina. Oni akceptas novelojn en aliaj

lingvoj, se oni aldonas tradukon en Esperanto. La defio estas proponita en du kategorioj: spertaj kaj komencantaj verkistoj. Partoprenontoj devas sendi siajn tekstojn ĝis la 30-a de junio 2025. La ĵurio konsistas el reprezentantoj de diversaj kulturoj. Venkintoj estos anoncitaj okaze de la 111-a Universala Kongreso de Esperanto, en aŭgusto 2026.

Por pliaj detaloj:

<https://bobelarto.ink/eo/konkurso/>.

Daŭrigo de la paĝo 13 (La juĝisto kaj la ovo)

(Krome li skribis pri la aĝo de la anaso kaj de la ovo). Tamen, se Via Moŝto deziras, mi povas ĵuri publike, ke ĝi ne estas ovo, sed ŝtono.

— Admirinda! — ekkriis la reĝo, ĝojoplena. — Sendube ĉi tiu estas la viro, kiun mi volas kiel juĝiston. Kaj la regnestro tuj nomumis lin.

Multe da tempo pasis, tamen ankoraŭ ekzistas reĝoj, kiuj elektas tiamaniere la juĝistojn de siaj regnoj...

(**Malta Tahan**, pseudonimo de la brazila verkisto Julio Cesar de Mello e Souza (1895-1974) – Rakonto originale verkita en la portugala lingvo, esperantigita de **José Mauro Progiante**)

La anagramo de Anna

Juan Trepiana

Anna alproksimigas sian oreĵon al la muro de sia ĉambro kaj atente aŭskultas. Ŝi susuras ion kion mi ne komprenas, aŭ nur ridetas.

—Sufiĉas! Anna, ne estas bone aŭskulti la najbarojn!

—Mi nur lernas, panjo, ne maltrankviliĝu.

—Ho, kiel interese! Kaj kion vi lernas aŭskultante aliajn?

Anna ridetas sen forpreni sian oreĵon. Ŝi rigardas min per siaj belaj okuloj, duonfermitaj pro la rideto.

—Ne aliaj, panjo. Estas paĉjo, kiu instruas min. Vi scias, la patro estas nia najbaro...

Estas tre malfacile ne plori, sed mi ne ploras. Ŝia patro mortis en flugakcidento antaŭ tri jaroj. Ŝi estis nur eta knabino. Mi ja neniam ploris. Mi eĉ ne povas brakumi ŝin... Ŝi ne ŝatas tion. Ŝi preferas daŭre aŭskulti, ŝi ja preferas rakonti al mi ridante tion, kion ŝi aŭskultas, envolvita de la mola

lumo de la sunsubiro, kiu penetras hodiaŭ tra la fenestro.

—Tre bone, Anna, kaj kion vi lernis hodiaŭ?

—Multe da aferoj, panjo... Anagramoj, vortoj en la hispana...

—Ho... Kiujn vortojn en la hispana? mi respondis aŭtomate.

—Ĉu vi scias, kion signifas "pared" en la hispana?

—Ne. Mi jam rakontis al vi, mi lernis iomete en lernejo, sed mi jam forgesis ĉion.

—"Pared" signifas muron, panjo! (Anna ridetas) Ĉu vi scias, kio estas anagramo?

—Kompreneble, Anna, mi nur forgesis la hispanan, sed mi scias kelkajn aliajn aferojn. Anagramo estas ludo kun la literoj de la vortoj. Per ŝanĝado de la ordo de la literoj aliaj vortoj magie aperas, unu aŭ multaj en kelkaj kazoj.

Anna, iom post iom, aperas pli envolvita de lumo, tiu kiu iĝas strange blua kaj ŝi diras:

—Sed se la ludo estas en la hispana, per la vorto "pared" aperas nur unu anagramo, nome "Padre". (Mole ŝi diras) Ĉu vi komprenas?

Ne ĉiam estas tiel, panjo, se vi ludas kun la vorto "muro" en Esperanto, aperas "rumo", ekzemple. Sed... ĉu vi scias la signifon de "padre"?

Mi jam diris, ke mi ne ploras, kaj ke ŝi ne permesas al mi brakumi ŝin... "Padre" signifas patron, kompreneble...

—Jes Anna, mi scias tion sed, kion signifas rumo, knabineto? mi diris, ĉikanante.

—Ho, panjo! Ĉu vi ne konas tiun alkoholan trinkaĵon?

—Mi ne konas ĝin, sed mi nun demandas vin; de kie vi konas ĝin, malobeema knabineto! Ĉu vi ankaŭ lernas pri drinki alkoholon, aŭskultante trans la muro?

Anna ridetas dum la lumo iĝas pli bela, pli stranga, pli mistera.

—Aŭskultu, filineto, revenante al afero pri via patro, eble estus tempo,



ke ni parolu pri tio denove... Okazis ke...

—Panjo, mi jam scias. Li parolas al mi tiel, li estas kiel najbaro, onidiras... Mi aŭskultas lin kaj li ridigas min, dum li instruas al mi aferojn. Parenthese, li ankaŭ rakontas al mi amuzajn aferojn pri vi...

—Anna, vi scias, ke via patro...

—Jes, panjo, mi jam scias, sed li ne tiom ŝatas, ke mi estas de tiu flanko de la muro, tamen, li diras, ke li povas atendi tiom longe, kiom necesas... Bonvole, ne plu maltrankviliĝu, panjo!

Nokte.

Mia rigardo turniĝas al la planko de la ĉambro, kaj tre malrapide leviĝas al la portreto, kiu troviĝas sur la komodo. Tiu foto, tiu lasta foto. Anna kaj ŝia paĉjo... Nun mi pensas pri la vorto "pared", pri la vorto "rumo", pri la muro mem...

La aviadilo estis forflugonta al Hispanio, ŝi estis tiel feliĉa vojaĝi kun sia patro. Mi memoregas ĉion, ili ambaŭ estis tiel feliĉaj. Mi rememoras, ke mi revenis hejmen ridante la tutan tempon, provante konservi ilian

ridojn, kiuj nun por ĉiam troviĝas sur tiu foto. Poste mi memoras la novaĵojn, la frenezon, la malcertecojn, kaj poste certecon, kiun mi ne povis akcepti ĝis hodiaŭ.

Mi denove rigardas Anna'n, ŝiaj okuloj ankoraŭ estas lumo en la lumo, brilo, pleneco.

Ŝi ridetas al mi, sed jam ne estas vortoj.

Ŝi rigardas min la lastan fojon, kvazaŭ ŝi daŭros rigardi min ĉiam.

Mi provas diri ion, kio ne havus sencon sed, mi nur povas silenti... Poste silento, plenega de koloro, stranga malproksimo kaj tenereco.

Ŝi komencas piediri tre malrapide, la blua lumo de finiĝanta vespero havas intensecon, kiun mi ne konas, sed kiun mi neniam forgesos. Sono, kiu povus esti tuŝata, aperas, blua sono en la tuta ĉambro pliiĝas dum Anna trairas lume kaj mole la muron.

Restas nur ombro de la sono, eta eĥo de lumo, kiu ĉiam akompanos min. Mi denove rigardas la portreton. Unuan fojon, mi ploras.



La Baza Eduka Disvolva Indekso kaj ĝiaj efikoj al la brazila socio

Ĉi tiu artikolo celas prui la gravecon koni kaj taksu datumojn de la Baza Eduka Disvolva Indekso (IDEB), kiu reprezentas la evoluon de baza edukado en Brazilo, same kiel ĝiajn efikojn al vivo en socio. Koni kaj analizi la datumojn, kiuj reflektas la lernejan situacion kaj kvaliton, estas fundamente por krei pli efikan, justan kaj adaptitan edukon sistemon al la bezonoj de lernantoj kaj socio. Ĝuste per ĉi tiuj datumoj ni povas kompreni la realon, plani intervenojn kaj kontroli progreson al kvalita edukado por ĉiuj

Ĉi tiu indekso montris progresojn en iuj regionoj, elstarigante la pozitivan efikon de iniciatoj celantaj plibonigi la kvaliton de instruado kaj lerneja infrastrukturo. Ŝtatoj kiel San-Paŭlo kaj Minas-Ĝerajso, ekzemple, montris signifajn plibonigojn, reflektante lastatempajn investojn en instruista trejnado kaj ĝisdatigado de instruplanoj.

Tamen la panoramo ne estas unuforma. Kelkaj areoj daŭre alfrontas konsiderindajn malfacilaĵojn, precipe

en pli malproksimaj kaj ekonomie malfavorataj regionoj. Regionaj malfegalecoj restas maltrankvilo, kun la Nordoriento, ekzemple, montranta pli malrapidan rapidecon de progresado kompare kun aliaj partoj de la lando. Tio elstarigas la bezonon de pli laŭcelaj politikoj kaj plifortikigo de subtenstrategioj por lernejoj en pli malriĉaj lokoj.

Pozitiva aspekto elstarigita de la datumoj de 2024 estas la kreskanta inkludo de edukaj teknologioj. La aliĝo de ciferecaj iloj kaj novigaj instrumentoj kontribuis al plibonigo de la engaĝiĝo de lernantoj kaj faciligado de la lernado. Lernejoj kiuj efektivigis tiujn teknologiojn raportis pliiĝon en akademia efikeco kaj studenta instigo.

Malgraŭ tiuj progresoj, la analizo de IDEB ankaŭ montras la urĝan bezonon de investoj en daŭra trejnado de instruistoj kaj la modernigo de kursaj enhavoj. Prepari instruistojn por alfronti nuntempajn edukajn defiojn estas decide por certigi, ke lernantoj

ricevu bonkvalitan trejnadon, kiu adekvate preparas ilin por la estonteco.

Resume, IDEB-datumoj de 2024 proponas multfacetan portreton de la stato de edukado en Brazilo. Kvankam ekzistas kialo por optimismo, la vojaĝo por atingi altkvalitan kaj justan bazan edukadon por ĉiuj lernantoj restas decida defio. La sekva paŝo implicas profundan analizon de sukcesaj praktikoj kaj efektivigon de pli efikaj politikoj por venki ekzistantajn malegalecojn kaj antaŭenigi pli unuforman kaj inkluzivan edukan disvolviĝon.

Grava punkto, kiun oni devas pripensi, estas la graveco de legado celanta bazan edukadon. Legado estas fundamenta kolono en la kogna kaj socia evoluo de individuoj kaj, tial, devus okupi centran lokon en brazila edukado. Pensi pri edukado koncentrita al legado ne nur temas pri promocio de malkodado kaj tekstokompreno, sed ankaŭ pri kultivado de amo al libroj kaj dumviva lernado.

Antaŭenigi legadon en baza edukado povas esti vidata kiel strategia investo en la estonteco de la lando. Kompetentaj legantoj pli verŝajne disvolvos analizajn kaj kritikajn kapablojn, esencajn por akademia kaj profesia sukceso. Krome, legado stimulas la imagon, vastigas vortprovizon kaj plibonigas la

kapablon koncentriĝi, kontribuante al ampleksa edukado de la lernanto.

En Brazilo, kie legadprocentoj ankoraŭ estas maltrankviligaj, koncentriĝi pri legado-edukado povas helpi renversi ĉi tiun scenaron. Laŭ lastatempaj esploroj, multaj brazilaj studentoj alfrontas malfacilaĵojn por kompreni tekstojn kaj verkadon, kio rekte influas ilian akademian progreson kaj ilian kapablon eniri la labormerkaton. Tio montras la urĝecon integri legadpraktikojn pli efike en la lernejan instruplanon.


Alia grava punkto, kiun la bonkvalita brazila edukado povas helpi venki, estas la redukto de krimo, kiel kolektiva fenomeno. IDEB-datumoj havas la potencialon kontribui al redukto de krimo en Brazilo, kvankam nerekte. La rilato inter edukado kaj krimo estas kompleksa kaj multfaceta, sed jen kelkaj manieroj, en kiuj IDEB-datumoj povas pozitive influi publikan sekurecon kaj redukti krimon. Ni povas mencii kelkajn punktojn: Identigo de Regionaj Neegalecoj, Intervenoj kaj Komunumaj Programoj, Kreado de Integraj Edukaj Politikoj.

Kvankam IDEB-datenoj ne rekte solvas la krimproblemon, ĝi disponigas decidajn informojn kiuj povas esti uzitaj

(Daŭrigota sur la paĝo 21)

Lingvaj Respondoj

de Francisco Wechsler



Demando

En novelo de la fama verkisto Julio Baghy oni trovas la jenan frazon: ... *ĉar tia parolo, kian ĵus vi diris estas malpermesite kaj kio estas malpermesite, tio estas leĝo kaj la leĝoj estas de Dio*. En ĝi oni trovas adverbojn, kiuj rilatas al substantivoj. Ĉu tio estas normala, ĝusta konstruo en Esperanto?

Respondo

Mallonge: ĝi certe estas nenormala, kaj tre dubinde ĝusta. Fakte ekzistas en Esperanto ekzemploj, kie adverbo rilatas al substantivo aŭ substantive rolanta vorto, tamen nur kiel nuancilo. Jen kelkaj Zamenhof-aj ekzemploj:

*Kion la volapükistoj povas respondi al mi? **Absolute nenion**, [...]* La tabelvorto *nenion* rolas substantive kaj la adverbo *absolute* rilatas al ĝi. (*La Esperantisto*, 1889–1890)

*Laŭ mia opinio estus tre utile, se vi eldonus ĝin ankaŭ en Esperanto, por ke ĉiu esperantisto, **precipe la verkantoj**, atente ĝin tralegu, [...]* La adverbo *precipe* rilatas al la substantivo *ver-*

kantoj. (Letero al R. de Saussure, 1910, O.V. p. 455)

*Kaj en efektiveco oni ĉe tio nenion gajnas: **ĝuste tio** devigas nin pensi pri malbono; [...]* La adverbo *ĝuste* rilatas al la tabelvorto *tio*, kiu rolas substantive. (*Georgo Dandin*, akto 2-a, sceno 1a, 1908)

*Sciu do, ke la Eternulo, via Dio, **nur Li** estas Dio, Dio fidinda, [...]* La adverbo *nur* rilatas al la la pronomo *Li*, kiu anstataŭigas substantivon kaj kompreneble rolas substantive. (*Malnova Testamento, Readmono 7:9*, 1916)

Pliaj ekzemploj estas troveblaj en *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*, de B. Wennergren. →

Por la supre citita uzo fare de Baghy, mi trovis neniun pravigon. Certe pli akcepteblaj estas la formoj:

*ĉar tian parolon, kian ĵus vi diris estas **malpermesite diri***

*ĉar tia parolo, kian vi ĵus diris estas **malpermesita**.*

*kaj kio estas **malpermesita**, tio estas leĝo kaj la leĝoj estas de Dio.*

Daŭrigo de la paĝo 19 (Edukado)

por direkti klopodojn kaj resursojn al areoj bezonantaj intervenon. Plibonigi la kvaliton de edukado, trakti regionajn malegalecojn kaj efektivi komunumajn programojn bazitajn sur edukaj datumoj povas kontribui al kreado de pli sekura medio kaj reduktado de krimfofteco longtempe. Edukado estas unu el la multaj faktoroj kiuj influas krimon, kaj pli forta kaj pli justa eduka sistemo povas ludi gravan rolon en konstruado de pli sekura lando.

Resume, investi en edukado koncentrita al legado estas investi en la integra evoluo de lernantoj kaj en la konstruado de pli priinformita kaj kritika socio. Prioritatante legadon en nia eduka sistemo, ni preparas studentojn ne nur por akademiaj defioj, sed ankaŭ por iĝi engaĝitaj kaj pri-pensemaj civitanoj. La estonteco de brazila edukado sendube implicas

plifortigon de legado kiel centra kaj nemalhavebla komponanto de lernado. Por ke ni povu vidi ĉiam pli pozitivajn rezultojn en la brazila socio.

Patricia Guerra Radsack

PhD-studento ĉe Salgado de Oliveira University – Niterói-RJ Campus. Havas magistron de Universidade Salgado de Oliveira – Campus Niterói-RJ.



Estas diplomita pri Historio ĉe la Universitato Salgado de Oliveira en São Gonçalo – RJ. Ŝi havas kvalifikaĵojn en Geografio, Sociologio kaj Filozofio. Disvolvas esploradon en la areo de krimo en la regiono Santa Luzia do Carangola fine de la 19-a jarcento.

Freneza Dorvalino

Paulo P. Nascentes¹

Mi estas Tao, la ulo. (P. P. Nascentes)

Verki kreive, klare, konvinke. Jen la pasio de freneza Dorvalino, la Sen-Nociulo, defio alfrontebla de malmultaj. Se freneza, kiel klara, konvinka? Kreiva eĉ de la 16-jaraĝo, nun 70-jaraĝulo, li sindemandas kiel kapti la atenton de Leganto, Legantino, laŭdifine ĉefroluloj, sen tamen fali en batatajn formulojn: konflikto, dramo, intrigo, tempo, scenejo. Nu, tion eĉ platformoj de Artefarita Inteligento produktas aŭ klopodas produkti. Kiel do? Jen tion persekutas tiu libro. Ĝenro?! Ĉu difini tion ne estus kvazaŭ pereigi la tielnomatan *malferman verkon*?!

Uzu la carbon, renversu kapo-mal-supren, kuiru neŭronojn. Ĉu hazarde rakontaĵo, novelo, kroniko, eseo, poezio, taglibro de adoleskanto, verkitaj mensogoj, fikcio, ĉio tio kune miksitaj? Aŭ ĉu nenio tia? Bv. ne elektu la plej bonan alternativon. Mistero, se mistero estos, postvivos ĝin pro la aŭdaca

naivo de ruzaj ĉion-sciuloj. Restu de nun interkonsentite. Adjektivoj maskle aperos. Ili aplikiĝas al ĉiuj ekzistantaj aŭ inventotaj ĝenroj. LGBTQIA+ estas siglo kies socian gravecon mi rekonas! Luktojn, movadojn, komunumojn mi respektas. Sed, ĉagreni iun ajn faros mi ne, tipe *leganto, legantino, legant-@j, impertinentuloj, impertinentulinoj, impertinentul@j*. Enuo! Se tro necesi sin enfiksu, sin enpaku kien estu komforta. Tiel parolis Zaratustra. Tiel parolis Dorvalino. Finfine, tiel parolas mi!

Ĉu verki estas arto? Esprima verkado, ĉu terapio? Verku ĉion venontan viakapen, kvazaŭ vi vin elverŝu surpaperen. Terapiaĵo, jes. Onin sendas tio al antaŭe vualaj, obskuraj, retenataj tavoloj. *Skribaĉu* ion sencenzure. Sen halti, sen pensi, dum ĉirkaŭ 10 minutoj ĉiutage. Povas tio venigi vin aŭtentecon, malvualigi sufokatajn voĉojn, elfosi trezaŭrojn meze al koto, eventuala malbonodoro, putraĵo. Diamantoj marĉe ekaperas. Postulas ili purigon, sekigon, poluradon. Restu la

defio. Ĉu ĝin vi alfrontu? Ĉu valoras eventuala profito?

Risko estas, ke vi trovu mezvoje la juvelon de neatendita poeziaĵo. Se okazos tio, humile ĝin prizorgu poste. Kontraŭe al la dekomenca skribaĉo, kiun vi kaŝu, tiun sekvantan vi rajtas venigi lumen, se vi volos.

Al mia freneza kapo iam venis tiu surpriziga teksto. Almenaŭ por mi, Dorvalino, ĝia aŭtoro.

KREPUSKO

*ĉu manskribi vin
ĉu tajpe klavi vin
io agitiĝas io ekbolas min
kio vin mi donas
tio taŭgas nin
silenton krias mi
kiu papili' (ne scias mi)
tiom da koloroj*

*donis ĝi al mi
ĉiu amo ĉiu amor'
ĉio jen tabul'
desejniĝo via
via profil-odor'
allogas min ĉi vir-abel'
satigas min via miel'
mi polenigas vin
sigelo ĉelo kor'*

*ĉu manskribe ĉu klavite
mia poem' kor-tuŝu vin
eĉ mia entuziasmo
sveni venigu vin
en hebeteca orgasmo
klavomiksiĝo freneze
mesaĝa verso-stelumadas*

via buŝplafon'



⁽ⁱ⁾ Verkis la supran artikolon Paulo P. Nascentes. Temas pri unu el la unuaj ĉapitroj de lia venonta libroforma beletraĵo, nome **Rabiscos poéticos de um Sem-noção**: o avesso do percurso, baldaŭ sendepende publikigota. Mia antaŭa libro troviĝas en **Percurso às avessas – Editora Penalux**. Se vi volos koni aliajn beletraĵojn de la Aŭtoro iru al **Papos Nascentes**.

Pri volontuloj kaj okulvitroj

Paulo Sergio Viana

En la ĵus pasinta monato julio 2024, pro familiaj problemoj, mi devis pasigi kelkajn tagojn en Madrido. Kia bela urbo, plena de imponaj arboj kaj ĝardenoj, kie eĉ en la varma, seka somera aero floras bedoj invitantaj al promenado! Kaj la bone edukita popolo vige moviĝas kaj vivas en sufiĉe prospera socia stato.

Min akceptis en la ĉefurbo grupeto de simpatiaj Esperantistoj el la Hispana Esperanto-Federacio por agrabla, amika babilado. Pro tio mi eksciis pri la freŝa eldono de grava libro, ĵus eldonita de "SAT en Hispanio". La bela volumo ricevis la titolon "Volontuloj kun okulvitroj", kaj fakte enhavas du apartajn verkojn. La unua estas "La hispana tragedio", de la nederlanda aŭtoro Jef Last; la dua estas "Hispana somero" de norvega aŭtoro Nordhal Grieg. Ambaŭ temas pri la hispana interna milito, en la jaroj post 1930, do antaŭ preskaŭ cent jaroj.



La hispana milito fariĝis grava historia okazaĵo, plena de simbolaj signifoj, kaj ĝis hodiaŭ ĝi elvokas dikutojn kaj analizojn, simile al tio, kio okazis rilate la francan kaj la rusan revoluciojn. Aparta trajto estas, ke multaj intelektuloj alvenis al Hispanujo por batali por siaj politikaj konvinkoj (jen kial oni aludas al "okulvitroj" en la titolo de la nova hispana eldonaĵo).

Mi supraĵe komentos ĉi tie nur la unuan el tiuj du libroj en la nova volumo. Ĝi konsistas el leteroj, kiujn la aŭtoro sinsekve verkis, dum li aktive, eĉ fervore partoprenis en la bataloj. La leteroj pritraktas diversajn aspektojn de la vivo de eksterlandano, kiu volonte pretis helpi la hispanajn fratojn. Li estis komunisto, do "ruĝulo", laŭ la tiam alnomado. Li detale priskribas la kruelan suferadon de la popolo sub bombado, sub malsato, sub malsanoj. Li priskribas la vivon en tranĉeoj plenaj de musoj kaj pedikoj, kie koto kaj malvarmeo turmentis la soldatojn. Li priskribas la mizeron kaj mankon de edukado de la popolo, kiu tamen heroe rezistis al invadantoj. Li priskribas en viveca maniero la morton de kamaradoj, kaj sian propran konstantan riskon.

Post preskaŭ cent jaroj, impresas la nunan leganton la politikaj fervoraj kredoj de la aŭtoro. Li priskribas siajn partianojn kiel superajn homojn, kiuj ofertas la vivon (kaj la vivon de siaj

familianoj) por la konstruado de ia nova mondo pli justa: "No pasarán!"

Nuntempe, tiuj ideoj aspektas de longa tempo forpasintaj. La mondo ŝanĝiĝis en maniero nekredebla, tiel ke la hispana socio kreskis kaj evoluis, kaj la hodiaŭa popolo verŝajne apenaŭ komprenas la fervorajn politikajn kredojn de antaŭ cent jaroj. La kurioza rivaleco, ekzemple, inter komunistoj, trozkiistoj kaj anarĥiistoj, sonas preskaŭ nekomprenebla al nuntempa juna madridano.

Jen la graveco de tiu libro. Ĝi instruas historion, kiun oni devas ne forgesi, eĉ se la tiamaj ideoj draste ŝanĝiĝis. Oni lernu, ke doktrinoj kaj skoloj estas efermeraj, kiel la homoj mem. Kaj tamen idealistoj ĉiam bele kontribuas al la progreso de la homaro. Ili defendas la pacon, sed ili firme kredas, ke ili batalas kontraŭ maljusto kaj ekspluatado. Lernintion, eble ni ĉiuj povas fariĝi pli toleremaj kaj fratemaj.



Baldaŭ lanĉota en Paulínia

Kurba kaj aliaj noveloj

12 rakontoj originale verkitaj en Esperanto

16º Congresso Paulista de Esperanto



Paulínia/SP 14 -15 set 2024

Tema
A chama do Esperanto



Local
Hotel Ibis Paulínia

Endereço
Rua 31 de Março, 290 - Santa Cecília

Realização



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Apoio



Mais informações: easp.org.br/asocio/paulinia2024